PROLETOJ DE LA MONDO UNUIGU VIN !

# Internaciisto

Organo de Kolektivo Esperantista Komunista (KEK)

ADMINISTREJO, REDAKTEJO: FONT NOVA 32, ES-08202 SABADELL (HISPANUJO)

N-° 2 (74) MARTO - APRILO 2005 JARKOLEKTO - 13



**Parta vidaĵo de Vilno**





**Bildoj pri Hotelo Panorama**





## Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK)

# 15-a KONFERENCO – VILNO LITOVIO 2005/07/20-23

(Tuj post nia Konferenco, ni urĝas vin partopreni IKEK-kunveno(j)n kadre de la 90-a **Universala Kongreso de Esperanto,** Vilno 20/05/24-30)

Organizanto: Dieter Rooke, Äussere Klus 14, 47702 Oensingen. Svisio. Tel. 0041 623 960 186 < **dieter.rooke@tiscali.ch**>

Konferenca horaro
Merkredo, la 20-a de Julio: 14:00 h. Salono disponebla; 20:00h Interkona vespero.
21-a ,22-a, 23-an (Sabaton): 09:00h - 17:30h (tri tagoj) –laborkunvenoj.
(Sabato la 23-a, 20:00h. Interkona vespero je komenco de la Universala Kongreso)

Konferencejo
Hotelo"Panorama"**www.hotelpanorama.lt** 14 Sodu str., Vilno, Latvio. Apud busa kaj fervoja stacidomoj. La stabo scipovas la anglan, rusan kaj polan lingvojn.
IKEK aranĝis grupajn prezojn ĉe Hotelo "Panorama". Vi mem devas kontakti la hotelon por rezervi lokon, citante referencon "IKEK". Antaŭpago NE necesas. Mendu tagmanĝojn kaj vespermanĝojn surloke. Eblas pago surloke. Ĉiu ĉambro havas propran duŝon kaj necesejon, TV kaj telefonon. Mendu ĉe **<renata.juskaitiene@hotelpanorama.lt) aŭ <reservation@hotelpanorama-lt>**
**Tel: +370 5 2738002, Faks. +370 5 21 63 789**
Hotel-prezoj (1 Eŭro = 3.4528 Lt.

> Tranoktado (lito kun matenmanĝo, ĉu en unulita aŭ dulita ĉambro):
> 56 Lt.; kun kontinenta matenmanĝo: 56 Lt; kun bufeda matenmanĝo: 61 Lt.
> Tagmanĝo kaj vespermanĝo ĉe hootela restoracio: de 17Lt.

Konferenca kotizo: 15 eŭroj pagendaj por konferenca salono kaj aliaj komunaj kostoj.
Sendu al Dieter monbileton en koverto, aŭ pagu al UEA konto de IKEK = "KEKX-g" kun referenco "15-a Konf". Nepre informu al Dieter.

**Provizora Horaro- 15-a IKEK-Konferenco,**

20-a (Merkredo)
Alveno kaj registrado.
Ekde 14:00h Konferenca Salono disponebla por konferencanoj.
20:00-22:00 Interkona vespero.

21-an (Jaŭdo)
09:00-10:30 h. (1h30m) Sesio 1
Kafpauzo 30 m
11:00 –12:30m (Sesio 2
Tagmanĝo 1h30m
14:00 – 15:30h (1h30M) sesio 3
Kafpaŭzo 30m
16:00 – 17:30 (1h30m) sesio 4
(vespero libera)

22-an (Vendredo)
09:00 –10: 30 (1h30m) Sesio 5
Kafpaŭzo 30m
11:00 –12:30 h (1h30m) Sesio 6
Tagmanĝo 1h30m
14:00 –15:30h (1h30m) Sesio 7
Kkafpaŭzo 30m
16:00 – 17:30h (1h30m) Sesio 8

23-an (Sabato)
09:00 – 10:30h (1h30m) Sesio 9
Kafpaŭzo 30m
11:00 – 12:30h (1h30m) Sesio (10)
Tagmanĝo 1h 1h30m
14:00 -- 15:30h (1h30m) Sesio (11)
Kafpaŭzo 30m
16:00 – 17:30h (1h30m) Sesio (12)
Vespero libera.

**Kara k-do, eĉ se vi ne povas ĉeesti la Konferencon, sendu solidaran aliĝon aŭ donacon, kiu donos varmon al la ĉeestantoj. AGU SOLIDARE**

**STAN KEABLE**
**Prezidanto**



# ĈU LA KOMPARTIOJ REGRESAS?
## $$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Malfacila situacio signas la vojon de nia Komunista Partio de Aŭstrio (KPÖ). Diferencoj inter la membroj de la estraro jam dum monatoj akompanas la laboron de la partio.

Nelaste la decido de germana juĝejo malpropriigi nian partion de la monsumo, kiu estis deponitaj en GDR-a entrepreno faligis nian partion en financan ruinigon. Sekvis maldungoj kaj vendo de objektoj, kiuj troviĝis en posedo de la partio. Antaŭ tiu fono la partio krevis en du frakcioj, kio kulminis finfine en du malsamaj partioj. Tiu alvokita de la gvidanta estro Walter Bayer kiel partio de la delegitoj kaj la alia de la kontraŭa frakcio kiel partio de la membroj. Ambaŭ sin kulpigas reciprokre, pro malrespekto de la statuto. Mi persone ne povas juĝi pri tio, ne sufiĉe konante la statuton.

Tamen estas dolorige rigardi kiel droniĝas la ideo de Socialismo en disharmonio, kio amuzigas niajn malamikojn. Subite la Komunista Partio estas temo en televidaj elsendoj. Kutime la amasmedioj prisilentas nian partion, kvazaŭ ne ekzistus. Malice ili atendas la finon de la laborista movado.

Fakto estas, ke kiel Komunista Partio sola, ni povas movi nenion en ĉi tiu lando. Ni ne havas eblecojn atingi vastan publikon, ĉar ni ne disponas pri informaj amasmedioj. La oficiala organo "Die Volksstimme" (Voĉo de la popolo) oni devis ĉesigi ĝian eldonon pro la supre menciitaj kaŭzoj (financaj) kaj pro tio la lasta ebleco atingi pli vastan publikon estas forrabita.

La ceteraj amasmedioj ĵetas siajn mensogojn super la civitanoj, tiel ke la plimulto de nia loĝantaro kredas la asertojn, ke ni devas ŝpari kaj pro tio ĉiuj devas mem zorgi por pensioj kaj malsanasekuroj, ĉar la ŝtato ne plu povas "donacojn" oferti al la popolo. Tiel, granda nombro de nia popolo ne rimarkas, ke sian monon oni transsendas de siaj poŝoj al la poŝoj de la ĉefoj de grandaj entreprenoj kaj al tiuj de la financaj spekulantoj (akciuloj). Ili ne rimarkas, ke tiu diktado de konzernoj en la nomata Eŭropa Unio devigas la ŝtatojn dediĉi pli multe da rimedoj por militaj elspezoj, kiujn li suĉas el la buĝeto de socialaj elspezoj. Samtempe la ŝtato vendas la propraĵojn de la popolo al privataj entreprenoj, devige laŭ tiu KonstitucioEŭropa.

La sekvoj ne estas pretervideblaj, granda parto de la popolo malriĉiĝas, la mizeruloj multiĝis videble en la metropoloj. La infraestrukturoj de servaj retoj disfalas. Post privatigo de la poŝto, tiu fermas poŝtoficejon post poŝtoficejo, precipe en ruraj regionoj. En nia regiono, nun oni fermas la poŝtoficejon en vilaĝo, kie loĝas ĉirkaŭ 600 civitanoj kaj la plej proksima poŝtoficejo troviĝas je 25 kilometroj for, dum la publika transporto estas tiom limigita, ke oni bezonas plenan tagon por forsendi registritan leteron aŭ paketon. Kompreneble tio nur koncernas tiujn, kiuj ne posedas propran aŭtomobilon, sed ankaŭ ĉi tiuj multiĝas.

En la metropoloj la situacio ne estas pli favora, ĉar pro redukto de personaroj la vico de atendantoj antaŭ giĉetoj longiĝas. Krome, ĉiu ŝparita poŝtisto, fervojisto aŭ busŝoforo riĉigas la aron de senlaboruloj. Resume, la vivokvalito malaltiĝas en la plej riĉaj landoj de la mondo danke al la globigado.

En tia situacio nia partio krevas. Pro tio necesas trovi partnerojn por la lukto kontraŭ la diktado de la avidaj konzernoj, ankaŭ eĉ se tiuj ne estas puraj klasbatalantoj.

Tiam kiam en komuna vojo ni atingis la ĉefan celon, renversi la reakcian globigadan vojon, ni povas denove koncentriĝi al niaj radikoj.

**ERNESTO QUIETENSKY**

**N. de la Redakcio:**
**Kion pensus niaj bedaŭrataj kamaradoj Franz Schick kaj Franz Haiderer?**

---

## DIALOGO KUN NIAJ GEKAMARADOJ

Estas du frazoj, kiujn mi abomenas kaj ne deziras ilin skribi. Unu el ili estas la jena: **gekamarado ĉu vi jam pagis vian abonon aŭ kotizon?**
La alia estas: **Mi atendas viajn kunlaboraĵojn por nia organo!**
Bedaŭrinde mi, malfeliĉe, konstatas ke en aliaj organizaĵoj okazas same, sed tio ne kontentigas min, pli bone dirite ĝi tristigas min, ĉar mi konstatas, ke du grandaj idealoj restas marĝene por iuj gekamaradoj.
Esperanto kaj komunismo estas du grandaj valoroj. Gekamaradoj, ni luktu por ili!

**LUIS SERRANO PÉREZ**

# REFONDIĜO DE LA "RIFONDAZIONE COMUNISTA"

Por kompreni la politikan linion de la itala " Partito della Rifondazione Comunista", mi devas informi pri kelkaj datoj kaj nombroj.

En la lastaj balotoj de Eŭropa Parlamento kaj de kelkaj regionoj en Italio, la Partio sukcesis atingi la 6,1 procentojn ( au 2, 5 milionojn da voĉdonantoj) kaj atingis la kvaran lokon de la itala politiko.

Tian sukcesan rezulton, ni dankis ankaŭ pri la konsekvenca klara linio de la Partio pri senkompromita partopreno de Italio al imperialisma milito kontraŭ Irako.

Jam monatoj antaŭe al la atako de usona kaj britaj armeoj okazis en Italio grandaj pripacaj manifestacioj. En novembro 2002 partoprenis je komence 500.000 personoj iom poste ili jam estis 750.000. La 15-an de februaro 2003 kolektiĝis en Romo pli ol miliono da manifestaciantoj.

La homoj ne nur marŝis manifestacie, sed ili ankaŭ aktive partoprenis blokadon de fervojaj vojoj kaj stratoj, prokrastis la transportadon de la usona milita materialo de iliaj militbazoj en Italio al la ŝipaj havenoj.

Plene rimarkinda estis la fotaĵo de junulino, fiksante ruĝan flagon sur usonan tankon.

La plej grava organizanto de ĉi tiuj protestaj demonstracioj estis "Rifondazione Comunista".

Malgraŭ ĉio la dekstra registaro de Berlusconi ekde la komenco metis Italion je la flanko de la imperiisma aventuro de Bush.

Estis ignorata la artikolo 11 de la itala konstitucio, kiu malpermesas al Italio komenci aŭ partopreni en agresemaj militoj ekstere de la naciaj landolimoj. (kvankam same surtretis la konstitucion la "maldekstra" registaro de D'Alema, kiu kelkaj jaroj antaŭe ordonis la bombadon de Beogrado.)

Kelkaj miloj da soldatoj armitaj ĝis la dentoj estis senditaj al Irako "por helpi la popolon".

Intertempe la "Rifondazione Comunista" sukcesis konvinki la ceterajn opoziciajn partiojn kontraŭstari la partoprenon de Italio pri la okupado de Irako per komuna mocio en la Parlamento.

Sed tiu unueco ne estis longdaŭra, ĉar kiam falis la unuaj 19 soldatoj, la popolo restis ŝokita kaj la registaro tre lerte profitis la momenton kaj majstre scenigitaj manipulacioj vekigis falsajn patriotismajn emociojn. La mortigitoj estis prezentitaj kiel senlimaj herooj kaj la ceremonio de ilia entombiĝo en la panteono de la patrio estis montrita rekte per ĉiuj televidaj kanaloj dum horoj kaj horoj. Tion oni ripetis ankaŭ dum la sekvontaj tagoj. La plej granda parto de la popolo estas kvazaŭ hipnotigita, paralizigita. Kvankam ekzistis ankoraŭ multaj kritikuloj, sed dum tiu situacio neniu kuraĝis laŭte postuli la tujan retreton de la soldatoj. Nur la komunistoj kaj la anoj de la verdula partio daŭrigis sian pacan kampanjon. La ceteraj opoziciaj partioj silentadis.

En marto 2004 por la unua fojo estis sekvestritaj kvar italaj civiluloj fare de la irakaj partizanoj.

La registaro kaj parto de la opozicio tuj deklaris ke tiuj sekvestritoj estas senkulpaj ĉar ili estis laboristoj dungitaj de iu sekureca entrepreno. Nur "Rifondazione Comunista" kuraĝis aserti en sia presorgano "Liberazione", ke tiuj personoj troviĝis en Irako kiel soldatoj kune kun aliaj miloj da internaciaj bone salajritaj aventuristoj. La registaro de Berlusconi akuzis la komunistojn esti konsciaj iloj de la teroristoj.

Unu el tiuj kvar ostaĝoj estis ekzekutita (kiel oni sciis poste li estis ano de la faŝista partio) kaj la aliaj tri estis liberigitaj sub tre misteraj cirkonstancoj precize tri tagojn antaŭ novaj balotoj en Italio. Ne necesas diri, ke ankaŭ tiuj tri personoj estis konsiderataj kiel grandaj kaj kuraĝaj herooj.

Kelkajn monatojn poste estis sekvestrita itala ĵurnalisto E. Baldoni, sed en ĉi tiu kazo la registaro apenaŭ faris ion por lin liberigi kaj post kelkaj semajnoj li estis mortigita.

Intertempe renaskiĝis iom pli da malkonsento de la popolo koncerne al la milito, sed subite okazis nova evento. Aliaj du italaj virinoj (la du Simonoj) estis sekvestritaj en Bagdado, kiuj laboris por iu helporganizo. Komence la registaro sin tenis same, kiel ĉe la unua kazo de la ĵurnalisto Baldoni, sed sub la premado de protestoj fare de organizaĵoj kaj ordinaraj homoj sur la placoj kaj stratoj, Berlusconi estis devigata entrepreni ion pli konkretan kaj li komencis per la invito al ĉiuj opoziciaj estroj al komuna kunsido por klopodi trovi ian solvon cele savi la du virinojn kaj ankau eĉ se ne rekte pri la afero de la italaj soldatoj en Irako. Al tiu kunsido partoprenis ankaŭ k-do Bertonotti, nacia sekretario de "Rifondazione Comunista".Tuj post tiu kunsido okazis io stranga. Bertinotti, kiu ĉiam estis memdecida kaj kompromita pri ĉio

kio koncernis la militon, nun li komencis ŝanĝi sian politikan linion. Al intervjuoj de la burĝara gazetaro li deklaris, ke nun ekzistas prioritatoj. Al demando de ĵuranlisto, ĉu ankoraŭ por "Refondazione Comunista" la retreto de la trupoj el Irako estas la unua postulo?. Li respondis, ke ne, unue oni devas savi la du virinojn. Li nun parolas ankaŭ pri la neceso kontraŭstari la terorismon kaj aldonis, ke la popola rezistado en Irako ne estas komparebla al tiu de la italaj partizanoj dum la dua mondmilito; se la lastaj oni devas skribi per grandaj literoj, tiun rezistadon en Irako oni povas skribi per malgrandaj. Nun eĉ se malrekte, li pravigas la politikon de Bush kaj liaj komplicoj, ili jam batalas kotraŭ la terorismo.

Do, la terorismo (bedaŭrinde) kiel ekstrema aspekto de la rezistado, ne estas legitima reago al la milita okupado, sed kontraŭe, ĝi estas la kaŭzo, kiu pravigas la okupadon kaj militon. **Aberacia logiko!**

Iom poste, kun teatra scenigo, dum matena aŭroro, kaj antaŭ jam preta televida kamerao, la du virinoj estis liberigitaj. Nu, la vasta protesta movado lamis.

Intertempe, kadre de la Partio kreskas pli da malkontento koncerne al la nova politika sinteno de Bertinotti. La italaj gekamaradoj estas lastatempe malpacemaj kaj misorientitaj inter si mem.

Kiaj novaj perspektivoj kaj celoj ŝprucos de la baldaŭa eksterordinara nacia kongreso, kio okazos je la fino de februaro aŭ komenco de marto en Rimini? Ĝi estas io ne prognozebla. Minimume oni esperas, ke oni kreu klarecon.

**ALESSANDRO CALAPRICE**

**MEMBRO DE LA NACIA POLITIKA KOMITATO EN SVISIO.**

---

**JARON 1492**
**"Konkero de Ameriko**
**Ili venis.**
**Ili havis la biblion kaj ni posedis la landon**
**Ili diris: fermu viajn okulojn kaj preĝu!**
**Kiam ni malfermis niajn okulojn.**
**Ili posedis la landon kaj ni la Biblion"**
**LA PRALOĜANTOJ**
**$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$**
**Heroldo la plej ofta gazeto de la E-movado.**
**Peranto. Luis Serrano Pérez**

# PRI INKUBOJ

Mi preskaŭ ne estis rimarkinta, ke la usonaj prezidentaj balotoj jam estis okazintaj, sed hazarde ĉe ĵurnala vendejo mi vidis gazeton sur kiu per grandaj literoj estis skribita: **"George W. Bush por la dua fojo".**



Bush, la granda atagonismo de Eŭropa Unio. Lia esprimo sur la foto estis timiga kaj la fono estis plena de minacantaj nigraj nuboj.

Tiel staris s-ro Goerge W Bush, fiera kaj memdecida turmenti la eŭropanajn revojn. Sed, kia Eŭropo?, ĉu tiu de la kruckavaliero? Tro olda. Ĉu la lulilo de la kapitalismo? Jes, tio troviĝas ankoraŭ ĉi tie sed ne tiel militema kaj avida kiel en Usono. Ĉu eble la Eŭropo de la koloniistoj kaj faŝismo? Ĉu tiu ĉi jam tute postlasita malantaŭ niaj ŝultroj?, aŭ ĉu la nova liberigita Eŭropo, tiu kiu bombadis Jugoslavion? Ĉu jam forgesita?

Nun nia soldataro staras en Afganio kaj Irako. Ĉu nur kiel simplaj komplicoj de la "helpantoj"?

Kaj kio okazas kun nia eŭropa pacifismo? Kio estas pli kritikinda, ĉu se nia reprezentantoj trinkas teon en libia dezerto , aŭ ĉu aliaj pli orienten sen teaj tasoj, sed kiuj per kanonoj klopodas sin stabli? Ni estu en fremdaj landoj, same kiel dum pasintaj tempoj, malegoisme, puraj, altruismaj sen kaŝitaj intencoj.

Tia estas la substanco de nia sonĝoj... el kiu elstarigas ankaŭ niaj Inkuboj.

**SANDRA NIKOLODI (Svisio)**


---

V.I. LENIN

"Libereco de publikigoj" en la burĝa socio estas libereco de riĉuloj al trompado, malĉastigado. Mistifikado de la ekspluatataj kaj subprematai popolamasoj, de malriĉularo, sistematike ĉiutage, en milionoj de ekzempleroj.

Bezono pri ĉiam pli granda kvanto da konsumantoj de burĝa produktado pelas la burĝaron tra la tuta terglobo. Ĝi emas ĉie enpremiĝi, ĉie instaliĝi, ĉie ekhavi ligojn.

Bus



ɪrtoprenis reprezentantoj de 78 maldekstraj partioj
idanro de Latvia Socialista Partio A. Rubiks kune kun reprezen-
le Svedio, Irlando kaj Litovio.




tandardoj de grekaj komunistoj inspiras ilin al la lukto.



ndardoj de Grekia Komunista Partio, la manifestacion partoprenas
o, kiu defendas vicojn de manifestaciantoj.

## INTERNACIA RENKONTIĜO DE KOMUNISTAJ KAJ LABORISTAJ PARTIOJ EN ATENO

## "NI PLIFORTIGU LA BATALON KONTRAŬ MIZERO KAJ SENRAJTECO"

Opinias la Prezidanto de Latvia Socialista Partio Alfreds Rubiks, ke vastan resonancon en la mondo kaŭzis la Internacia Renkontiĝo de komunistoj kaj laboristaj partioj, kiu okazis de la 7-a ĝis la 10-a de Oktobro en Ateno.

Ĝin partoprenis reprezentantoj de 78 maldekstraj partioj el 68 landoj de la tuta mondo. La ĉefa temo de la renkontiĝo estis: **Kontraŭstarado al la imperialisma agresemo. Batalfrontoj kontraŭ ĝi kaj alternativaj proponoj"**

Dum la diskuto estis trarigardata vasta kvanto da demandoj pri la evoluado de la amasmovadoj kontraŭ politiko de la imperialismo kaj pri la fortigo de la solidareco de laboristaj movadoj en la batalo por rajtoj de laboruloj.

La partoprenantoj de la renkontiĝo akceptis specialan deklaron pri rimedoj de informado. En la deklaro estas esprimita la pozicio de la partoprenantoj pri problemoj de la 21-a jarcento. Dum la renkontiĝo, laŭ iniciativo de Latvia Socialista Partio estis akceptata speciala rezolucio por defendo de politikaj kaj civitanaj rajtoj de eksaj membroj de Latvia Komunista Partio.

**Ni petis la prezidanton de Latvia Socialista Partio A. Rubiks, komenti la diskuton kaj la akceptitajn dokumentojn.**

A.Rubiks diris: Ĝi estis jam la naŭa renkontiĝo de komunistaj kaj laboristaj partioj de la mondo. Dum ĝi, same kiel en la antaŭaj renkontiĝoj regis etoso de kamaradeco kaj interkompreno. Ni nenion havas por disdividi inter ni. Nin ĉiujn, en iu aŭ alia grado maltrankviligas la ĉiam pli furioza ofensivon de la kapitalo kontraŭ rajtoj de la laboruloj. Antaŭe iun ĉi ofensivon haltigadis la ekzemplo de socialaj atingoj en Soveta Unio. Post ĝia disfalo ankoraŭ pli videbla fariĝis la svingo de ekspluatado de la laborhomoj. Kapitalistoj penas alpreni el la laborhomoj tutajn iliajn fortojn, senigi ilin de tiuj multaj sociaj avantaĝoj, kiujn ili akiris dum multaj jaroj de malfacila batalado. Kaj kontraŭ tio ĉi eblas kontraŭstari nur per amasaj protestoj, manifestacioj kaj strikoj, kiel solidareco inter la laboristaro.

La partoprenantoj de la renkontiĝo unuanime notis, ke imperialismo fariĝas ĉiam pli agresema, Dum apero de problemoj ĝi ĉiam pli ofte aplikas forton.

Tamen aliflanken sur la tuta planedo kreskas kontraŭstaro al la imperialismo, neoliberalismo. Koncentriĝo de riĉuloj en unu poluso kaj de malriĉuloj en la alia. Akriĝas la batalado tiel interne de apartaj landoj, kiel same en internacia skalo. Kreskas kontraŭdiroj al la usona politiko de "nova ordo".

Ĉie kreskas strikado, protesta movado. Ĉiam pli ofte apud la ekonomiaj postuloj sonas ankaŭ la politikaj. Ĉiam pli laŭte oni aŭdas postulojn forigi bazojn de USA kaj NATO, eligi armeajn taĉmentojn el Irako, ĉesigi politikan kaj ekonomian premadon al Kubo, Norda Koreo. Jen ankaŭ la renkontiĝo akceptis rezoluciojn subtene al popoloj de Kubo, Norda Koreo, Irako, kiuj luktas kontraŭ la imperialismo.

**PRI KIO TEMIS VIA PAROLADO?**

Antaŭ ĉio alia mi parolis pri tio, kio hodiaŭ maltrankviligas laboristojn de mia lando kaj nin, la socialistojn. Post aliĝo de Latvio al Eŭropa Unio kaj NATO la vivo de la laboristoj fariĝis ankoraŭ pli peza. Pensioj estas malproksime ne nur de la eŭropa minimumo, ili eĉ malproksimiĝas de minimuma vivnivelo. Medicina priservado fariĝas luksaĵo. Mi notis, ke ni batalis kontraŭ aliĝo de Latvio al EU kaj NATO, ke ni avertis loĝantaron de Latvio pri la pezaj postsekvoj de tiu ĉi paŝoj. Tamen la ŝtata propaganda maŝino rezultiĝis pli forta ol niaj agitantoj. Nun multaj bedaŭras pri tio, ke ne atentis argumentojn de socialistoj, sed estas jam malfrue por alispeca balotado.

Nun necesas lerni por defendi rajtojn de laborista popolo, jam en kadroj de Eŭropa Unio, uzante la riĉan sperton de la eŭropaj laboristoj. Cetere, tion jam komencis lerni latvia gastlaboristoj, kiuj serĉante laboron veturas eksterlanden. Tie, eŭropaj kapitalistoj senindulge ekspluatadas ilin, pagante al ili je 30 - 50 procentojn malpli ol al la lokaj laboristoj. Kaj kvankam la gastlaboristoj dume silentas kaj toleras opresojn, ili tute ne estas indiferentaj al tio, kiamaniere laborhomoj en Eŭropo defendas siajn rajtojn. La gastlaboristoj tie akiras sperton kaj post iom da tempo komencas uzi tiun sperton en Latvio.

**KIA ESTAS VIA OPINIO, KIAN SPERTON DE MALDEKSTRULAJ PARTIOJ UZU SOCIALISTOJ DE LATVIO?**

Antaŭ ĉio alia ni vastigu nian influon inter laboristoj, ni forte pligrandigu ilian kvanton en vicoj de Latvia Socialista Partio. La sperto de la eŭropaj partioj konvinkas nin, ke necesas fortigi niajn ligojn kun progresemaj sindikatoj, helpi al ili per vorto kaj ago, ĉar niaj celoj estas la samaj. Kaj ili, kaj ni volas ke laboristoj estu malpli eskpluatataj, ke laboristoj estu inde pagataj pro la laboro. Ni ankaŭ multe lernu de la eŭropanoj pri organizado de amasaj movadoj. Mi kaj aliaj partoprenantoj de la renkontiĝo ankoraŭfoje konvinkiĝis pri tio ĉi, ĉeestante en Ateno la 50-milhomajn manifestacion de laboranta popolo de Grekio. Sub la ruĝaj standardoj de Grekia Komunista Partio, kun komunaj postuloj iris junaj kaj maljunaj homoj de diversaj profesioj, de diversaj nacioj kaj religioj.

Kaj jen kion ili postulis: certigi minimuman laborsalajron egalan al 1200 €. Pri tiaj postuloj la laboristoj de Latvio ankoraŭ eĉ ne sonĝis. Mi eĉ ne parolas pri senpaga medicina priservado kaj pri senpaga ŝtataj infanĝardenoj, pri 35-hora labora semajno, pri egalaj rajtoj por viroj kaj virinoj kaj asekurado por enmigrintoj, kiuj vivas en Grekio.

Laboruloj de Grekio juste opinias pri sia rajto vivi pli bone. Ili intencas postuli de kapitalistoj kontentigon de siaj postuloj. Ili scias, ke sen lukto ne estas venko. Jen ankaŭ ni, socialistoj de Latvio, pli persiste kaj pli aktive batalu kontraŭ la mizero kaj senrajteco, altiru al tiu ĉi batalo ĉiam pli vastajn amasojn de laboristoj. Ni forigu la humoron de prizorg-ato, la humoron, kiu en la popolo restas de jam pasinta tempo, kiam sufiĉis skribi kolektivan leteron kaj sendi ĝin al Rigo aŭ Moskvo por atingi solvon de problemo.

Certe, ankaŭ hodiaŭ eblas skribi, kaj eĉ al prezidento de Latvio kaj al komisaroj de Eŭropa Unio. Tamen kalkuli je ilia helpo povas nur kapitalistoj. Kaj estas almenaŭ naive por laboristo atendi, esperi kompatemon fare de siaj ekspluatantoj.

Pli bona vivo ne venos per si mem. Por ĝin atingi necesas batali!

Tiun ĉi konkludon ankoraŭfoje konfirmis ankaŭ la renkontiĝo en Ateno.

**El ĵurnalo "Latvijas Socialist" Oktobron 2004**

**Esperantigis : Andris Nátinŝ (Latvio)**

# 60 - JAROJN DE LA SOCIALISMA REVOLUCIO EN BULGARIO

## La eventoj en Bulgario dum septembro 1944, jaro en kiu kulminis la batalo por demokratio kaj socia egalrajteco en la lando kaj komenco de nova sukcesa etapo en la evoluo de la bulgara Esperanto-movado

**De Dimitar Papazov**

La ideo pri neŭtrala internacia lingvo, kiu favorus neniun landon havas preskaŭ miljaran historion. De la tempo de la renesanculo Jam Komenski ĝis la komenco de la 20-a jarcento oni kreis pli ol 500 projektojn pri internaciaj lingvoj, el kiuj restis vivkapabla nur la internacia lingvo Esperanto.

Pro la proklamo de lingvo egalrajtiga por la internaciaj rilatoj ekde ĝia apero en la vasta lingva horizonto Esperanto estis pli proksima al la homoj maldekstre orientitaj, kvankam oficiale ĝi estas konsiderata neŭtrala.

Je la fino de la 19-a jarcento la socialistaj movadoj en Eŭropo ligas ĝin kun la ideo de sociala egalrajteco por la estonteco de la homaro, kiu devas havi unu komunan lingvon.

En la unuaj dekoj de la 20-a jarcento la fondintoj de Kominterno ligas ĝin al komunismaj ideoj. En la jaro 1930 fondiĝis Internacio de la proletaj esperantistoj (IPE). Post la 7-a Kongreso de la Kominterno, laboristaj esperantistoj amase agadis en la politike neŭtralaj Esperanto-asocioj, kiujn ili uzis kiel tribunon. La bulgara Esperanto-movado ne estas escepto ĉi tiu rilate en Eŭropo. Bulgario estas unu el la unuaj landoj, kie Esperanto estis akceptata post la apero de la unua lernolibro en 1887- jaro en kiu ĝiaj adeptoj, maldekstre orientitaj, organizis Esperanto-societon post tiuj de Njurberg kaj Odeso. En 1907-jaro la bulgaraj esperantistoj fondis Bulgaran Esperantistan Asocion. La asocio estis neŭtrala, tamen la membroj povis uzi la lingvon laŭ siaj interesoj en la diversaj aspektoj de la vivo.

La Balkana milito en 1912, la Interaliancana milito en 1913 kaj la Unua Monda Milito post 1914, en kiu partoprenas Bulgario, haltigas la evoluon de la bulgara Esperanto-movado. Post la Unua Monda Milito la bulgara Esperanto-Movado travivas impeton kune kun la espero de Eŭropo por pli egalrajteca mondo de paco kaj interkompreniĝo. En 1921 en Sofio fondiĝas Komunista Esperanto-Asocio **"Balkana liberiga stelo"** La celoj de la societo estas ligi la komunismajn ideojn kun Esperanto, tamen pro la faŝisma puĉo en Bulgario dum 1923 kun ĝia teroro, la societo ne povis funkcii. Dum la dua duono de la dudekaj jaroj komencas aperi sub redaktado de la fama pli malfrue sindikata aganto kaj ĵurnalisto kaj esperantisto Nikola Aleksiev la gazeto "Balkana laboristo", kiu grupigas ĉirkaŭ si la maldekstre orientitajn esperantistojn, kaj kiuj en 1930 fondis Bulgaran Laboristan Esperantistan Asocion /BuLEA/. BulLEA laboras politike ene de la neŭtralaj esperantistoj por ilia allogo al komunismaj ideoj kaj inter la adeptoj de la komunismaj ideoj por ilia allogo al la Esperanto-movado. Rezulte de tiu laboro baldaŭ ĝia membraro pligrandiĝas. La membraro de la neŭtrala Bulgara Esperanto-asocio malgrandiĝas.

La presorganoj de BulLEA en bulgara lingvo kiel "Internacia laborista kamparano korespondanto" plenaj de aktualaj informoj, estas je la dua loko laŭ eldonkvanto inter la progresemaj eldonaĵoj. La asocio organizas amase Esperanto-kursojn kaj kulturklerigajn aranĝojn. La 19-an de majo puĉo de la jaro 1934 en Bulgario, bedaŭrinde finigas tiun ĉi riĉan Esperanton kaj komunisman agadon. Granda parto de la agantoj de BuLEA vivas eksterleĝe aŭ estas arestitaj. La sociaj organizoj sub influo de Bulgara Komunista Partio tamen daŭrigas sian laboron eksterleĝe aŭ duonleksterleĝe. La laboristaj esperantistoj orientiĝas al neŭtrala Bulgara Esperanto-asocio, kie ili aktivas, kvankam ili ne estas membroj, kaj la vigleco en la asocio estas tuj sentebla dum la sekvontaj jaroj. Krom en la teroraj atakoj kontraŭ la Esperanto klubejoj, la vigligo estas videbla ankaŭ en la eldonagado.

Tiamaniere danke al siaj tradicioj , al la demokratia karaktero de la Esperanto-movado kaj de la sperto de la maldekstraj esperantistoj en Eŭropo, kun kiuj konstante kontaktis, la bulgaraj laboristaj esperantistoj eniras al neŭrala Bulgara Esperantista Asocio kaj en aliaj amasaj bulgaraj organizaĵoj, ankaŭ antaŭ la 7-a Kongreso de la Kominterno kiu pere de la raporto de G Dimitrov donas instrukciojn pri tio al la progresemaj fortoj

en la mondo. En la bulgaraj ĵurnaloj "Zarja" kaj "Nova Kambana" sub la redaktado de Ivan Keremedĉiev-Esperov kaj Asen Grigorov (pli poste sekretario de Georgi Dimitrov post lia reveno al Bulgario) komencas aperi Esperanto-paĝoj, en kiuj oni rakontas pri Esperanto kaj la vivo en diversaj landoj kaj ĉirkaŭ tio ankaŭ pri la batalo de la laboristaro en ĉiuj landoj por pli egalrajta vivo, aktivis tiamaniere la laboristoj en Bulgario per surlokaj luktoj. Post la komenco de la Dua Mondmilito en Bulgario Esperanto estas malpermesata. La laboristaj esperantistoj estas en diversaj frontoj de la batalo kontraŭ la faŝismo. Iuj el ili kiel la sekretario de BuLEA Nikola Ŝopov estas en la atakgrupoj, aliaj kiel Hristo Gorov en la partizanaj taĉmentoj, tiuj, kiuj estis enprizonigitaj uzis la lingvon kiel kanalon por informado enlanda kaj eksterlanda. La finon de la Dua Mondmilito ili akceptas kiel naturan venkon de siaj konvinkoj por demokratio atingita sub diversaj formoj, kaj unu el ili estis la Esperanto-agado, ili batalis dekojn da jaroj. Ili subtenas la registaron de la Patrolanda Fronto je 9-9-1944, kaj ankoraŭ dum la sekvontaj monatoj restarigas Bulgaran Esperantistan Asocion kaj oni fondas Bulgaran Esperantistan Kooperativon.

La laboristaj esperantistoj aktive laboras por la renovigo de la lando kaj ili havas gravan rolon en la konstruado de la nova Bulgario, pri kiu batalis kaj revis. Por ili la 9-9-1944 dato estas kulmino ne nur de ilia batalo, sed batalo de la tuta bulgara popolo por paco kaj socia egalrajteco. Sendepende pri kiaj postenoj ili respondecas, ĉu sindikataj, partiaj, kulturaj, ekonomiaj, administraj, ili ne forgesas Esperanton, pri kiu dekojn da jaroj ili laboris cele al paco egalrajteco.

La logiko de la totalismaj reĝimoj estas la sama sendepende de la ideologio. La rilatoj de la stalinisma gvidantaro ne estas bona por la Esperanto-movado kaj tio reflektiĝas ankaŭ en Bulgario.

Pro la fakto, ke la laboristaj esperantistoj havis grandegan aŭtoritatecon en Bulgario dum la batalo de la progresemaj fortoj dum deko da jaroj en la medio de la maldekstrulara amaso kaj pro la personeco de Georgi Dimitrov, eksĝenerala sekretario de Kominterno, kies koncepto por li estis ĝuste la laboro en organizaĵoj kiel Bulgara Esperantista Asocio. la stalinisma malpermeso de Esperanto, severe plenumita en aliaj eŭropaj landoj ne validis en Bulgario, kiam Georgi Dimitrov estis ĉekape de la ŝtato. Des pli malgraŭ la manko de papero post la milito, Georgi Dimitrov komprenis la gravecon de la laboro de la progresemaj esperantistoj, donas instrukciojn al la koncernaj ŝtatorganoj subteni iliajn eldonaĵojn.

Baldaŭ komencas aperi diversaj eldonaĵoj, kiel la bulgara Esperanto-gazeto "Internacia Kulturo" kaj multaj libroj.Bulgara Esperanto-movado estas lumigilo inter la esperantistoj en Orienta Eŭropo, kiuj kredis, ke tiu malpermeso de Esperanto estas miskompreno. Jes, ankoraŭ dum la dua duono de la 50-a jaroj aperas la unuaj signaloj de nova rilato al Esperanto. La bulgaraj laboristaj esperantistoj, kiuj haltigis sian aktivan laboron nur dum kelkaj jaroj, dum la 1956-jaro rekomencas sian agadon, kiu atingas sian kulminon dum la 80-aj jaroj.

En la sesdekaj jaroj komenciĝas amasa libro-eldonado kaj kleriga laboro. En la jaro 1963 kaj 1978 Sofio kaj Varna organizas du Universalajn Kongresojn de UEA, kun du Internaciaj Junularaj Kongresoj en Vraca kaj Veliko Tarnovo, kiuj donas plian impulson al la bulgara Esperanto movado. La merito pri tio estas antaŭ ĉio de tiuj idoj esperantistoj, kiuj ligis Esperanton kun la komunismaj kaj maldekstraj ideoj kaj trovis inter iliaj adeptoj bonan medion, kie ili laboris dum jardekoj. Ili edukis ankaŭ novan esperantistan idaron, kiu akceptis iliajn ideojn.

Post la komenco de ŝanĝoj en Sovetunio kaj Orienta Eŭropo jam pasis pli ol jardeko. Bulgario estas antaŭ eventuala eniro en Eŭropa Unio dum jaro 2007. Ni estas observantoj kiel Bulgario strebas gardi limdatojn laŭ planite. En tiu ĉi strebo la lando interesiĝas nur pri problemoj, ligitaj kun la eniro en E.U.. Tamen E.U. havas ankaŭ aliajn problemojn, kiujn Bulgario devos alfronti, se fine ĝi estos akceptata. Unu el tiuj problemoj, pri kiuj E.U. elspezas amason da mono, estas la lingva problemo. Ne hazarde de tempo al tempo estas miskomprenoj inter la membro-landoj pri tiu problemo. Bulgario en sia strebo eniri en E.U-n estas nune tre malproksime de tiu problemaro, tamen ĝi devas estis preta pri ĝusta rilato. Kiel alternativo, kvankam finance neniu subtenas ĝin, estas planlingvo kiel Esperanto, kiu havas jarcentan kulturon kaj literaturon kaj reprezentantojn en ĉiu fako de la scienco. Bulgario, sperta en la internacia laboro por internacia lingvo, povas sin bone prezenti en E.U. Tio povas estis kontribuo de la lando por eŭropa kaŭzo. . Ni kredas, ke tiu nova ido estos ligita kun la tradicioj de la socialisma revolucio en Bulgario, kiujn ĝuste esprimis la ĉefredaktoro de "TRUD" kaj "LABORO", nia bedaŭrata kamarado Nicola Aleksiev. Esperanto en nia lando estas intime ligita kun la ideoj pri demokratio kaj progreso.

**Estas bone, ke ni parolas, kaj plibonas se ni parolas per komuna lingvo**

## Kio ankoraŭ sen solida mondo-ordo?
### Tamen, se ĉi tio estas fantazia ekblovo, ĉiu-kaze ĝi povas malkovri la hipokritecon de la internacia politiko

Kvankam La Okcidento (LO) jam posedas altajn potencojn de jarcentoj da sociaj politikaj spertoj kaj eksperimentoj, moderna teknologio, materia progreso kaj prospero kaj vastega, plej influa reto de amas-komunikiloj – al ĝi la heredanto de mondaj scioj kaj ties lertaĵoj, tamen ankoraŭ mankas la volo antaŭenigi fidindan ordon, kiu povos gajnigi la homaron de nia mondo kaj resanigi la vundojn de nia komuna hejmlando, ĉi tiu planedo.

Kial, do, la manko? Oni laŭ mi devas unue rigardi reen. LO estas la heredanto de la roma kulturo – Romo, kiu multe kaj longe ekspluatadis la mondon kaj reen malmulte donis al ĝi. Tiun LO-on nuntempe regas persone ambiciaj profesiaj politikistoj, kiuj malgraŭ de sia aserto, ke ili reprezentas siajn "naciojn", fakte, baze reprezentas la interesojn de siaj triboj aŭ klasoj. Krome, al tiu LO ankoraŭ ne prosperas eliri de sia psika geto de timo de "la alia" – nun ĉefe la mondo de Islamo. Oni ĉi-rilate emas forgesi, ke estanta si mem kombinaĵo, kaj formita ĉefe fare, de multaj antaŭaj maturaj kulturoj, la tiel bunta mozaiko de Islama homara tutkulturo ne povas esti fremda – ne menciu timiga – al iu ajn alia. La kruelaĵoj de "9/11" kaj "3/11" kaj similaj, dume, estas sovaĝa ago de "varmkapuloj", kiujn inicie provokas insultoj kaj humiligoj fare de LO kontraŭ Islamo. Ekzemple, la kreo de Israelo (-"an autpost in an alien culture" (" fora posteno en fremda kulturo" usona Int. Herlad Tribune) kontraŭ la volo de la islama mondo *videble kun malica intenco, ke tio restu fokuso de malpaco en la regiono,* aŭ ĉu LO kreis Israelon pro "promeso en libro, aŭ pro amo al judoj?! Kiujn nur Islamo protektis tra historio kaj ja povis denove akcepti kiel rifuĝintoj kaj poste civitanoj same kiel ĝi akceptis milionojn da aramenoj dum la 1- Mondmilito), kreo kaj armigo de despotaj reĝimoj, instigado de civilaj militoj (libana, sudana, alĝeria, ktp), kaj regionaj militoj (araba-israela, Irak-irana, Irak-Kuvajta, ktp) kaj nuntempe eĉ rekta simile la detruada okupado de islamaj landoj – Afganio, Irako.

*Cetere , kvankam de ŝajna diversaj kulturoj, Islamo kaj LO tamen estas oftaj historiaj partneroj pri konstruado de homara civilizacio.* Islamo ankaŭ restas paralele kun Kristanismo kaj do pioniro pri la principo de moraleco pri homaj fratecoj, justo kaj libero. Modernajn t.n. socialismajn konceptojn oni povas facile dedukti el islamaj kaj leĝaro ("Sharia") kaj tradicioj. Tiaj konceptoj efektive mankis al LO tra sia historia konduto. Individuaj homoj baze ja estas moralemaj, ĉar tio estas la natura animo de Homo, tamen moraleco ofte mankas al la politika konstruo de LO-aj rilatoj, unue inter si mem tra eŭropo-civilaj senĉesaj sangaj konfliktoj ene de ĝi, kaj ankaŭ ĉirkaŭ la cetera mondo tra konstantaj militoj, okupado kaj ekspluatado. Ĉi-rilate, imperia Ruslando (eĉ SU) estis ĉiam parto de LO, (alie, kielmaniere ĝi povis dumnokte rerilatiĝi kun la resto de LO?)

Nun ni ĉiuj dolore rigardas al nia ĥaosa sufera mondo, por kiu ni ĉiuj deziras solidan mondo-ordon. Jen, do mia "fantazia" sonĝo temanta pri tia mondo, kiam ni povas ja atingi, en simplaj vortoj, laŭ mi, pere de la jenaj rimedoj.

**(A)** Monda senarmigado, kaj do abolicio de arm-komercado. Tiuj, kiuj produktas armojn kaj komercas per ili inkluzive de armoj de amas-detruo (AAD) estas ĉefe kelkaj superŝtatoj. **La homaro devas lukti por montri al tiuj politikistoj la eblecon kaj avantaĝojn de monda sekureco sen tiuj armoj.** Ĉar la mondon nuntempe pleje influas unuobla potenco Usono, monda senarmigado povas esti eĉ pli facila atingebla celo, se tiu Usono, la nuntempa kondukanto de potencega LO, povas konvinkiĝi pri ties avantaĝoj.

Teorie, eblaj rivaloj estas Ĉinio kaj Japanio. Kvankam ankoraŭ virtuale milite okupata, Japanujo tamen ŝajnas esti nune inerta (ĉu kontenta?) pri sia stato kiel ekonomia servisto de LO, (Japanujo produktas varojn tamen ne konsumas ilin, ĉar ilia vivmaniero tradicie estas modesta. Pro mono-bursa internacia ruza sistemo, LO regule ŝtelas la ekstran riĉaĵon de Japanujo). Se oni ne provokas ĝin per de ĉantaĝo (ekz- ekonomia sieĝo). Ĉinio ne kutimas pri eksteraj aventuroj. La islama mondo ne strebas al potenca rivaleco kun LO, sed nuntempe al liberiĝo de ties malbona influo. Se tiuj superpotencoj interkonsentas pri tia senarmigado, la ceteraj landoj ŝajne pli volonte konformos. Por plenumi tiun "sonĝon", oni bezonas filozofojn-politikistojn – ekz-e ne vulgara kvazaŭ-lernej-knabecan ŝtatestron!.

**(B)** Sindeteno de igado de malfeliĉaj statoj por landoj de t.n. "tria mondo", politikaj, ekonomiaj kaj militaj. Tio povas, laŭ mi, okazi laŭ jenaj rimedoj:

(a) Sindeteno de perfortigo de despotaj reĝimoj al tiuj landoj , t.e. ne armigu kaj ne instigu ilin militi unuj kontraŭ la aliajn (Israel-militoj, Irako-Irano. Irako-Kuvajto)

(b) Komerci kun tiuj landoj nur per maŝinoj por civilaj industrioj kaj simple utilaj varoj, kiuj mankas al ili.
(c) Konsilo kun helpo al tiuj landoj por plibonigado de siaj vivo-niveloj kaj eduk-nivelo, kaj aparte pri familio-planado.

(C) Naturaj rimedoj de la Terglobo estas Dio-donaco por ĉiuj homoj. Akvo, nafto, amas-nutraĵ-kultivaj kampoj kaj pluv-arbaroj, same kiel potenco-rimedoj kiel naturaj mineraloj kaj moderna nuklea teknologio por civilaj kaj sociaj utiloj kaj similaj, ĉiuj ĉi ĝenerale devas esti taŭge administrataj laŭ internaciaj traktoj tielmaniere, ke iliaj utiloj devas esti haveblaj al ĉiuj, ĉiu proporcie laŭ propra bezono kaj kontraŭ negoceblaj justaj kondiĉoj.

(D) Komuna planado fare de tiuj super-ŝtatoj laŭ-grada konvertado de multe da siaj industrioj – aparte tiuj de armigado – tiel ke ili ĉefe servu al civilaj celoj, ŝparu mondajn riĉaĵojn, kiujn oni pro tiuj industrioj nuntempe malŝparas, kaj antaŭenigu medio-amikajn sociajn kaj industriajn politikojn. La evoluita Okcidento povas tielmaniere konservi sian civilizacion, avantaĝojn kaj favoran viv-manieron dum mil jaroj en pli sekura mondo. Ĝi povas tiam ankoraŭ plue oferti multe da sia teknologia supereco, bonaj sociaj sistemoj kaj kulturo al cetera mondo, supozeble neniam kontraŭ malpli da gajno. Tio ankaŭ, por, ke la AADaro, unue kreita fare de LO ne estu relanĉota de la anguloj de la senigatoj kaj mizeruloj de la mondo.

(E) Oni devas plibonigi la staton de la Organizaĵo de La Unuiĝintaj Nacioj, (UN), ekzemple pere permeso pri maljeso (veto)-rajto por naci-grupoj kiel Arabo Ligo (de 24 nacioj) kaj tiu de Latin-Amerikaj nacioj kaj Slav-nacioj. Oni devas ankaŭ plifortigi UN-on pere de asigno de pli da potenco por ĝi por trakti mondajn problemojn, kun propra pac-konserva armeo funkcii ĉirkaŭ konfliktoj-areaj. Nepre, UN devas firme posedi propran fonton da sufiĉa fonduso por resti solida, forta, sendependa kaj neŭtrala inter siaj membroj. Ĝi devas finfine evoluiĝi kiel efektiva mond-registaro kaj nursola tribunalo de internaciaj aferoj.

(F) Antaŭenigado de kulturaj interŝanĝoj inter nacioj. Kultura alirado ja certe taŭgas por konduki al pli bona kompreno kaj pacemaj rilatoj inter popoloj. Tamen estas ĉirkaŭ 6000 vivaj lingvoj parolataj ĉirkaŭ la surfaco de la Terglobo, kaj tio restas grandega malhelpilo. Jara kosto de interpretado/traduko por la Eŭropa Parlamento (en Strasburgo) estas 600.000 dolaroj, kaj nun estas serioza debato pri la problemo, ĉar la Eŭropa Unio (EU) jam konsistas je 25 landoj de diversaj naciaj lingvoj (The Guardian 23-04-04). Iu maniero venki tiun gravan obstaklon estas proponi la facile lerneblan Internacian Lingvon Esperanto, al nacioj de la mondo kiel komunan dua interkomprenilon por ĉiuj. (Esperanto estis rekonata kaj laŭdata unue fare de La Ligo de Nacioj 1923, poste fare de UNESKO de UN je 1954 kaj 1985.)

Fine, tamen ne malpli grava. Ekzemple, al nuntempa franca filozofio, LO-a civilizacio aspektas same kiel veturilo, kies ŝoforo kondukas ĝin tro rapide pro bremsi antaŭ granda roko, kiun li vidas antaŭ li! Oni scivolemas ĉu tiuj politikistoj povus permesi al si la imagon kaj bonvolon (unue, tamen, la longdaŭran intereson) eventuale servi siajn landojn kaj reston de la mondo – fakte la tutan estonton de la homaro sur ĉi tiu endanĝerigata Terglobo. Ĉu ili povus akcepti kaj evoluigadi taŭgan mondo-ordon, kiu laŭ mia modesta opinio neniam estas preter la povo de La Okcidento, tamen nur **se ili** – la mem-mallonga tempo-interesaj superaj ludantoj – povas konvinki sin mem konsenti kaj kunveni kunkune por agi por tiu celo antaŭ ol estos tro malfrue por ni ĉiuj.

Oni povas nomi ĝin utopio aŭ iluzia sonĝo, tamen mi kredas, ke ni devas atentigi homojn, ke ĉi tiu best-speco, kies potenco nuntempe vagas en la suprajn profundojn de la universo ne povas esti malkapabla aŭ ne meritinta je paco malsupre ĉie tie sur sia Terglobo

**Se ne , ĉi tiu "fantazio" povas montri kielmaniere mankas bonvolo kaj sekve necesas agado ĉe LO.**

HUSEJN AL-AMILY (Britio)

---

**TRAKTU KUN ILI!**

**(Nu, nun devas pagi popolanoj la fakturojn)**

**En la grandaj demonstracioj,**
**La popolanoj avertis siajn estrojn**
**Ne militon kontraŭ Irako!**
**Sed la avertojn negletis la estroj,**
**kaj diverse subtenis la jankiojn,**
**dum la popolo malĝuis pro malvera informado**

**Tute la estroj ne volis traktatojn,**
**kun la gvidantoj el Afganistano, Irako**
**kvankam de tiuj ĉi ĝi estis ofertite.**
**Nur la perfortajn metodojn,**
**volis uzi ĉi tiu okcidenta bloko,**
**sed tion ne komprenis islamano edukita!**

**PENTTI TÖRMÄLÄ (Finnlando )**

# Novaĵoj el Londono (Novembro 2004)

Lastatempe Londono gastigis la Eŭropan Socian Forumon; ni spektis la filmojn 'Fahrenheit 9/11" kaj 'The Corporation' (La Korporacio) kaj ni alkovris la libron 'La Nova Pearl Harbour' ; krome 27 Kubanaj sindikatistoj alvenis Britio por renkontiĝa konferenco kun britaj sindikatistoj; okazis longaj vicoj por aŭdi ĵurnaliston, Naomi Klein, kiu alfrontis transnacian kompanion kaj venkis; Bush estas denove en La Blanka Domo kaj sekve Bush kaj Blair nun agas senpune en Irako. Ili ordonas kruelegecojn, kiujn ni tage vidas televide ĝis kiam ni ne plu reagas - estas preskaŭ normalaĵoj.

Ĉe la Eŭropa Socia Forumo mi antaŭdecidis subteni la Kubajn kunvenojn pro la severega danĝero, kiun Kubo nun alfrontas. Antaŭ la elekto, Bush estis dirinta al bojeganta ĉeestantaro de kubanaj eksilitoj en Florido ke "La kubanoj devos esti liberigitaj de ilia tirano". Mi ĉeestis 3 paroladojn de (Dro) Aleida Guevara (filino de Che), inkluzive tiun en Trafalgar Placo ĉe la kolektiĝo je la fino de la forumo, kiam manifestaciis kontraŭ la milito (en Irako) pli ol 100,000 homoj.

Pri 'Fahrenheit 9/11', Luis jam skribis en la lasta 'Internaciisto'. Pri 'La Korporacio', en kiu Michael Moore ankaŭ aperas ,ni vidas kiel la korporacioj tuŝas ĉiun parton el niaj vivoj.

Aperis en 2004 (en la angla) nova libro - 'The New Pearl Harbour – maltrankviligantaj demandoj pri la Bush Administrado kaj 9/11' verkita de David Ray Griffin, (ARRIS eldonisto, 12 Main Street, Adlestrop, Moreton-Marsh, Gloucestershire GL56 0YN). Ricevinte sufiĉan publicon ĉi tiu eksterordinara libro estus devinta fari ne elektebla Bush.

Pluraj grupoj klopodas ŝtatakuzi Blair (pro lia neleĝa militatako sur Irako), fine eĉ iuj parlamentanoj ĝin faras. Nur 23 el ili ĝis nun subskribis la proponon. Laŭ Dan Plesch, kuna aŭtoro de 'A Case to Answer' ('Argumento respondenda'), se iu parlamentano en la Laborista Partio subtenus, oni forprenus la instigilon kaj forigus ŝi/lin el la partio.

La Sindikatoj por Kuba Konferenco estis tre sukcesa. Francisco Duran Harvey, Asistanta Ĝenerala Sekretario el la Unio de Kubaj Sindikatistoj (CUT) emfazis, ke la plej grava por ili estas forigi La Blokadon. El la aliaj kubaj sindikatistoj ni lernis en la laborkunsidoj.

Niaj sindikatistoj diris jene:-

La Ĝenerala Sekretario de la Fervoja Unio, Bob Crow, proponis, ke se necesos ni organizu Internacian Brigadon por Kubo (kiel por la Hispana Intercivitana Milito)! Ruth Winterbottom, oficulo de la Fajrbrigadista Unio, diris, ke kvankam mankas al la kubanoj ekipaĵo, ili scipovas organizi – io kiu mankas ĉi-tie. Antaŭa Ministro en Laborista Registaro, Tony Benn, memorigis nin, ke Kubo estas modelo por la tuta mondo. Krome li aldonis, ke, kvankam la mondsituacio aperas severega, ni reprezentas la plimulton kaj ke la brita popolo estas pli maldekstra ol la registaro.

Fine, pri Palestino kaj Irako ( aparte nun Falluja), ni estas agemaj ĉi tie. Je la morto de Arafat, ni (en la Solidareco kun Palestina Kampanjo) staris sur la ŝtupoj de la preĝejo ĉe Trafalgar Placo, St. Martin's in the Fields du horojn tenante kandelojn kaj disdonante informajn folietojn. Ni bojkotas varojn el Israelio kaj ĉi-semajne

butikumas por Kristnasko ĉe la Palestina Metia Foiro. Krome oni ĵus petis nin kontakti la B.B.C. 2 (brita televidkanalo) por plendi pri la novaĵoj (2004-11-30), kiuj estis partiaj kontraŭ la Palestinoj. Ili nomis Gaza kiel 'teritorio disputata' anstataŭ okupita; dufoje ili diris, ke la Palestinanoj militas kontraŭ la judan malamikon, anstataŭ la Israelia okupacio; ili ne nomas la kolonietojn ilegalojn; laŭ ili nur estas violentaj la Palestinanoj, neniam la Israelianoj; kaj fine la intervjuisto agis agresive kontraŭ Afif Safieh, la Palestina reprezentanto en Londono.

Pri Irako, estas diversaj grupoj, kiuj faras malsamajn aferojn sed ni iom seniluziiĝas ĉar plejparte la gazetaro nin ignoras, kaj nenio ŝajnas efiki por ŝanĝi Blair kaj la partion. Eĉ novaj sindikataj ĉefoj trompis nin cedante fortan rezolucion kontraŭ la Milito ĉe la Laborista Konferenco en negoco, kiun poste kompreneble la partio ne plenumis.

La ne-violenta direkta agado fariĝas per 'Voices in the Wilderness', 'Voĉoj en la Dezerto'. Ili ekzistas ekde antaŭ la Unua Golfa Milito kaj dum ĉiuj la jaroj de la sankcioj. Same kiel la grupo en Usono, ili eĉ portis medicinojn al Irako, riskante grandan monpunon kaj esti malliberigitaj. Ni la subtenantoj haltigas la trafikon; ni metas blankajn florojn ĉe la Cenotafo por ĉiuj la(ne nombratajn) Irakojn kaj aliulojn. (Ĝenerale tie oni nur rajtas oficiale memorigi la falintojn el la Unua kaj Dua tiel nomataj Mondmilitaj.) Krome iuj el ni provas eĉ malebligi la aviadilojn foriri al Irako kaj ĉiam oni alvokas nin al loka tribunalo, kie aperas iu ribelanto. Kun alia grupo, amiko iris antaŭ la lasta 'milito' al Irako, kiel huma ŝirmilo.

La ĉefa grupo 'Stop the War' (Ĉesu la Militon) de tempo al tempo organizas grandan manifestacion, trairante la stratojn ĝis Trafalgar Placo. Oni planas nun por la venonta, kiu okazos la 19an de Marto, 2005, samtempe kiel nia nacia elekto. Cu oni re-elektos La Laboristan Partion kun Blair? Bedaŭrinde ne estas elekto – inter tri kapitalistaj partioj.

Lastatempe fondiĝis nova grupo, 'Iraq Occupation Focus' (Iraka Okupacia Fokuso). Ili ligiĝas kun Iraka sindikato ĉe suda Nafta kompanio.

Ni nun avide anticipas la 'International Teach-in' (Internacian Instruadon) pri Okupacio kaj Kontraŭstaro en Irako, kiun ili organizas por dimanĉo la 5a de Decembro. Estas invitataj Irakoj - Kuracistoj por Irako, 2 akademianoj (Instituto de Arabaj kaj Islamanaj Studoj, Exeter Universitato, kaj Haifa Zangana, verkistino, artistino kaj aktivulino, antaŭae politika malliberigita; krome venos iu el 'Un Ponte per Baghdad' Itala ne-registara organizaĵo el Italio; estos reprezentanto el 'Anti-debt campaign' (grupo, kiu kontraŭas la Irakan ŝuldon); diversaj okcidentalaj akademianoj, verkistoj kaj ĵurnalistoj kaj, tre grave, venos kaj la kunafondinto kaj nacia kunordiganto el Irakaj Veteranoj Kontraŭ la Milito (Britio) kaj Lou Plummer , el 'Usonaj Soldataj Familioj Laŭteparolas'.

Ĉi-vespere mi povas elekti inter aŭ manifestacii ekster la B.B.C. pro la partia kaj nesufiĉa raportaĵo pri Irako ( Laŭ ili, la tiel-nomitaj 'Aliancoj' plibonigis la vivon por la Irakoj!) – aŭ ĉeesti funebran honorigon por Daniel Anderson, ŝtata prokuroro en Venezuelo, ĵus asasinato pere de 2 bomboj fiksitaj al sia aŭto. Li kondukis proceson kontraŭ la "golpistoj" – tiuj, kiuj faris la 'coup' ( ŝtatan ribelon) kontraŭ Chavez . Mi partoprenos la duan, kie estos malpli da homoj. Kiel ni scias bedaŭrinde, parto de la maldekstrularo ne subtenas Kubon, Venezuelon ktp.

**ANNE JOHNSON**

# PROPONO SEKVI PRIMARKSISMAN KURSON

**Ĝi disvolviĝos en ses lecionoj.**

**1-a Kio estas Marksismo?**


**2-a Laboro.**

**3-a Ekspluatado.**

**4-a Klaso.**

**5-a Ideologio.**

**6-a Utopio.**



**Ĉiu kursano rajtas kontribui al la kurso.**
**Je la fino de la kurso laŭpete okazos ekzameno, kiu atestos la sukcesan trapason.Adreso de Kursgvidanto: Dieter Rooke, Äussere Klus 14. CH 4702 OENSINGEN Svisio. <dieter.rooke@tiscali.ch>**

## 1-a LECIONO
### Kio estas Marksismo?

Ĝi estas vorto elvokanta grandan emocion. Longaj suspektaj nocioj viciĝas: Kiaj stalinismo, diktaturo, dogmismo, materialismo, klasbatalo, revolucio.
Ankoraŭ nuntempe persistas negativa ĝenerala opinio.
La unua propagandilo por idearo retrospektive nomebla marksisma komenciĝas per la vortoj: Fantomo hantas en Eŭropo, la fantomo de komunismo. Ĉiuj potencoj de malnova Eŭropo alianciĝis por sankta ĉaskampanjo kontraŭ tiu fantomo. La Papo, la Caro. Metternic kaj Guizol, francaj radikuloj, kaj germanaj policistoj. **(Citaĵo el la Manifesto de Komunista Partio)**
Jen Koncize: Marksismo estas mondkoncepto kontraŭante fundamente la opinion de kapitalisma reganta klaso.

Demandite pri la verkaro de K. Marks multaj scias la nomon de lia ĉefa verko "La Kapitalo"

La respondo ĝustas. Tiu ĉi libro prezentas la penson de Marks, ĝian kontraŭ - kapitalismon kaj profanan karakteron. Sed ĉi tiu penso estas multfaceta.
15 jaroj antaŭ la ekverko de la libro , Marks formulis sian ideologion, rifuzante la tezon de filozofo Hegel. Male al Hegel. Marks asertis, ke homa konscio ne determinas lian ekziston..., sed male, homa ekzisto determinas la konscion. Alivorte dirite, la kerno de homa konscio estas la materio, kaj ne la supera ideo. Sed, kia estas la materio de homa ekzisto?
Ĝi videblas en formo de homa socio, kaj ĝin destinas fortoj politikaj.
Tiu ĉi fakto instigis al Marks esplori la kapitalismon.Tiutempe reganta la sociordon en la tiama Eŭropo.
Kaj kiel li sukcesis priskribi la kapitalismon? Nu, de filozofo Hegel li prenis la tezon, ke la reala kapitalismo estas nur priskribebla tra la evoluo historia. Sed tute ne nur sur la fono de idealisma penso, sed per la evoluo materia. Tiamaniere li fondis la skolon de materialismo historia.
El la verkaro de la filozofo Hegel li adoptis la dialektikon, (arto de esplori la veron) sed ĝi estas aplikata al la materio.

Li konkludis, ke ne tro gravas la ideoj, sed jes la materia bazo de nia homaro.
La materia bazo finfine ankaŭ destinas ideologion kaj progresigas ĝin.
Fundamenta instigilo por la progreso de la homaro estas laŭ Marks la rilatoj inter regantoj kaj regatoj. Tiun ĉi rilaton li priskribas per klasbatalo.
Li tezas, ke tutmonda historio estas sekvo de klasbataloj. Tial ĝi estas nur komprenebla, analizante la specifajn rilatojn inter diversaj klasoj en difinita socio.
Ne eblas vortigi teorion, sen esploro de realaĵoj. Alia konata sentenco de Marks legeblas sur lia epitafo: Filozofoj iele interpretis la mondon, sed necesas ŝanĝi ĝin!
Troviĝante li en rondo de filozofoj en urbo Berlino, li decidis translokiĝi al Parizo, kie ribelis gelaboristoj kontraŭ burĝaron. En Parizo Marks studis verkaron, programojn, utopiaĵojn de francaj pensuloj. Li rekomencis prilabori sian tezaron, studis ekonomion, kiu fine kondukos nin al ideologio nomata "Marksismo".

## EKZERCARO

Tiu tezaro estas eksponata de la instruisto al siaj lernantoj, kiuj siavice petas aŭ faras demandojn al kursgvidanto kaj ĉi tiu klarigis iliajn sugestojn.
Tamen ĉar ĉi tiu kurso estas per korespondado. La kursano devas analizi, komenti, kaj eksponi siajn pensojn favorajn aŭ ne al la tezo de la leciono, por ke la respondeculo de la kurso povos valori la konojn de la lernanto pri marksismo.

Atestilo pri la sukceso de la kursano eblas.

---

## LA SOCIETA ARKIVO RAKONTAS.

La Esperanto-societo "Vekiĝo" en Ŝumen, nordorienta Bulgario, kultura kaj historia centro, estis fondita dum januaro 1905. La organiza vivo estis aktiva kaj fariĝis faktoro en la landa E-movado. Bedaŭrinde ĝia energia agado fiaskis-as jam trifoje dum la jaroj: unue, dum la militperiodo 1912 ĝis 1918, kiam okazis la Balkanaj militoj, poste la Unua Mondmilito, duafoje de 1939 ĝis 1945 pro la kruela Dua Mondmilito kaj trie nuntempe, eble la plej danĝera eĉ por nia landa E-movado, ĉar post la politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj al ĉi tiu demokratio antaŭ 15 jaroj komencante fakte sovaĝa kapitalismo, amasa usonigado kaj influo nur de la angla lingvo, nia societo kaj landa e-vivo stagnas, postrestadas.

Tamen, dum tiuj jaroj inter "Vekiĝo"-anoj regis progresema spirito, estis progresemaj batalemaj gejunuloj, klasbatalaj laboristoj kaj intelektuloj, kuraĝaj agantoj kontraŭ faŝismo, aktivaj komunistoj. Tre bonaj lernantoj estis la junulo Belĉo Pavlov, poste fuĝinta al USSR kaj la gimnazia instruistino Vela Piskova talenta violonistino, sekretario de la senleĝa dikstrikta kompartia komitato, mortpafita de la faŝistaj ĝendarmoj. Dum la katastrofa Dua Mondmilito inter la viktimoj estis la heroo August Popov, politikaj maliberuloj estis la antifaŝistoj Ljuben Kaŝĉiev, Ĉanko Karaspasov, Ivan Smokov, Atanas Bojaĝiev, kiuj ĝisvivis la liberon je 9-9-1944, poste aktivaj KEK-membroj. Pro tiu multjara politika, kultura kaj progresema agado "Vekiĝo" estis distinginda per altaj ordenoj, kiam Bulgario estis socialisma popolrespubliko, per la Ora Insigno de MEM, honorigita per la "Signo" de Ŝumen je unua grado.

En la arkivo de "Vekiĝo", inter aliaj estas valoraj dokumentoj pro ĝia progresema kaj komunista agado. Ekzemple, estas konservitaj numeroj de "Balkana laboristo", gazeto de la proletaj esperantistoj en Bulgario, decembro 1929, tre valora Internaciisto organo de la klasbatala esperantistaro N° 38, marto 1932 kaj en bulgara lingvo, La Internacia lingvo kaj la laborista klaso" 1933. Valoraj estas ankaŭ la societa letero N° 19/1938, per ki la estraro petas permeson al la polico organizi E-kunvenojn. Ĝi pruvas, ke tiamaj bulgaraj faŝistoj severe rilatis al la Esperantaj ideoj. Menciindas, ke en la societa biblioteko estas "LEA kantaro" 1926. La "Komunista Manifesto" 1928 kaj kajeroj numeroj 4,5,8, 13 de Internaciisto, eldonitaj en Aŭstrio 1975.. "Vekiĝo" estis internacie konata, ŝatata dum la socialisma tempo 1944 –1989.

**KIEN NI TROVIĜAS?** Lastatempe la reprezentanto de la Monda Valuta Fonduso en Bulgario akre esprimis sian malkonsenton pro la plialtigo de salajroj fare de la registaro de 120 levoj (60 €) al 150 levoj (75 €). Tio estas 25% plialtigo. Liaj argumentoj estas, ke la bulgara ekonomio estas malforta kaj eble oni povus elteni ĝis 10% , kaj ke tiu plialtigo oni devas efektivigi laŭgrade.
Nun la vivo ŝajnas kvazaŭ "pli libera" laŭdire demokratia. Sed hora salajro en BG. 1,35 €, Portugal 8,13 €. Grekio 10,46 €, Hispanio 14,26 €, Germanio 26,60 €....ktp, La bulgaroj ne esperu pli rapide esti pli riĉaj"
**Laŭ la bulgara ĵurnalo "Libera penso". Kompilis: Cvjatko Todorov. (Ŝumen- Bulgario)**

INTERNACIISTO

Depósito Legal B-30-358-92
Leĝa Depono B-30-358-92
Edita Hispana E-Asocio
Eldonas. Hispana E-Asocio
Paĝo: WWW.IKEK.ORG
Impren/presejo DUGRAPHs.l.

REDAKTSTO

Luis Serrano Pérez
str. Font Nova 32
ES-08202 SABADELL
Hispanujo.
Tel. (+34) 937275021
luis_serrano@mixmail.com
Faksilo (34) 93 731 10 31

KIEL PAGI

Postmandate: Luis Serrano Pérez
aŭ al : IBAN ES50 Banco Sabadell
Konto: 0081 0900 82000671 24 80
Je la nomo: Luis Serrano Pérez
Nia konto ĉe UEA estas:
Internaciisto: KEKX-g

PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ RESPONDECAS ILIAJ AŬTOROJ

## AL GEKAMARADOJ DE LA KUBA KOMUNISTA KOLEKTIVO

Mi bedaŭras, ke mi ne povis esti inter vi dum via konferenco de Barako, je Decembro 2004.

Ni bezonas vian partoprenon en la laboro de nia internacia organizaĵo, por teni alten la ruĝan standardon de la laboristaro dum malfacila historia periodo, kiam nia klaso ŝajne malvenkis kaj la kapitalisma socia sistemo ŝajne venkis. Sed la kapitalismo kunportas siajn proprajn krizojn, kaj daŭre kreas la klason, kiu detruos ĝin, la laborista klaso, tiuj, kiuj ĉiutage estas devigataj vendi sian laborkapablon por vivi. La kapitalistoj bezonas nin. Ni ne bezonas ilin.

Nu, la batalo de la kuba popolo defendi sian sendependecon kontraŭ la atencoj de la tre forta kaj agresema imperiisma potenco de Usono estas heroa malegala lukto. La finfina rezulto dependos ne nur de la kubanoj, sed de la monda lukto renversi la kapitalismon. Ni komunista kolektivo kontribuos al tiu internacia lukto, kunigi la revoluciulojn de ĉiuj landoj, repensi ĉion en la lumo de niaj spertoj, kaj reforĝi niajn partiojn kaj nian internacion. La kapitalismo estas internacia, la laboristaro estas internacia klaso, la liberigo estos internacia!

La Internacia Komunista Esperantista Kolektivo estas malforta organizaĵo, kiu ekzistas unuafoje pere de, kaj danke al ĝia gazeto, Internaciisto. Dua esenca faktoro estas ĝiaj konferencoj, sen kiuj ni ne kapablus fari verajn diskutojn kaj decidojn.

Mi volas, ke vi sendu reprezentanton al la 15-a IKEK-Konferenco en Vilno, litovio, en Julio 2005, sed probable tio ne eblos. Mi faris enketon el K-do Dieter Rooke (organizanto de la konferenco) kaj Luis Serrano (redaktoro de Internaciisto) ĉu ni finance subtenu partoprenon de reprezentanto de Kuba KEK en la 2005 IKEK-konferenco. Sube mi redonas mian proponon, kaj la du malsamajn respondojn.

Post plia pensado mi opinias, ke pagi por veturo de kubano al Vilno povas esti tro granda elspezo por malgranda, malriĉa organizaĵo. La ĉefa afero de la organizaĵo estas la gazeto, kiu ligas membroj/abonantojn. Sen Internaciisto, IKEK malaperus, kaj tio estas reala ebleco, kiun ni nepre evitu..

Do, ni sekvu la konsilon de la redaktoro. Ni vokas al la membroj de Kuba KEK verki por Internaciisto.

**STANO KEABLE**
**Prezidanto de IKEK**

## FONDUSO

Lige kun tiu alvoko de nia k-do Stan, oni venis al konkludo starigi fonduson cele iam helpi kamarad-inon por ebla ĉeesto al niaj konferencoj. Bone ni scias, ke la afero estas ege malfacila ĉar inter ni bedaŭrinde la mono ne abundas kaj nin subvencias nenia organizo aŭ institucio. Sed komunisto (kaj esperantisto) ne povas perdi la esperon. En bonaj aŭ malbonaj kondiĉoj, sed neniel kaj neniam ni devas rezigni nian luktadon.

Tiun taskon realigos nia K-do Dieter Rooke, precipe ĉar li estas la ĉefa organizanto de la konferencoj. Lia adreso, kiun sendube vi jam konas : Dieter Rooke. Äussere Klus 14. 4702 Oensingen . Svisio. retadrreso: dieter.rooke@tiscali.ch

Redakcio